

# ESPERANTO

## ★ TRIUMFANTA ★

N-ro 20, 20. Febr. 1921

Jurnalo internacia, universala, sendependa  
eldonata de Teo Jung, Köln-Horrem (Germ.)

\* Eliras semajne. \*

## Obstine al la Ĉelo!

### Detaloj pri la instruo de Esperanto al 1000 infanoj en 10 lernejoj de Chemnitz. Esperantisto biciklanta el fremda ujo al Esperanta Kongreso.

Postkiam ni en numero 17 de nia jurnalo estis raportintaj pri la granda sukceso de instruisto E. Kirchner en Chemnitz\*) kaj de la tea Laborista Esp. Unuiĝo, aŭdigis voĉoj, kiuj dubis pri la ĝusteco de la afero, kiuj parolis pri trograndigo, pri sensacio, kaj jam oni riproĉis al ni, ke ni fantazie elrumpetis tiajn nekredelajn en la mondon. Nekomprenebla, ja tute neeble ŝajnis al multaj tia sukceso. Sed ĝi estas fakte!

Sabaton, la 29-an de januaro, posttagmeze je la tria horo, la Esp. instruado estas komencita en dek lernejoj de Chemnitz kun ĉ. ok cent infanoj. Post tiu tempo alvenis ankoraŭ multaj novaj anoj, tiel ke la nombro mil nun supozeble estas atingita, verŝajne eĉ superita. Dektri instruistoj (s-roj Arnold, Bachmann, Berndt, Flade, Franke, Hädebach, Herbig, Kirchner, Meizer, Nagel, Schneider, Stützer kaj Wolf) en ĉ. 20 klasoj nun instruas Esperanton al la infanoj.

Interese estas ekscii kelkajn detalojn pri la preparoj, kiuj rezultigis tiun unikan sukceson.

Antaŭ ni kuŝas serio de presajoj, faritaj de preseo Hesse & Kaufmann en Chemnitz, Königspiaz 4, laŭ planoj de s-ro Kirchner, kiuj estas evidenta pruvo pri la grandega antaŭlaboro kaj plej bona klarigo pri la tuta afero:

1. **Alvoko al ĉiuj gepatroj.** En tiu ĉi flavkolora folio, je tiel nekutima formo (25:55 cm), ke ĝi ne povas esti malatentata, la Laborista Esp. Unuiĝo en Chemnitz alvokas la gepatrojn, igi siajn infanojn por viziti la Esp. kursojn aranĝotajn por ili.

2. **Afiŝo.** En formato 50:60 cm. Kun parto de la teksto de l' alvoko.

3./4. **Alvoko kun aneksitaj aliĝiloj.** La alvoko havas saman tekston sed alian formaton kiel n-ro 1. La aliĝilo enhavas akcepto-kondicojn por la Esp. kursoj.

Du pluaj presajoj (5 kaj 6) estas komunikoj al la lernejaj direktoroj, praktike aranĝitaj.

Sepa estas poŝtkarta sciigo al la gepatroj, ke oni ricevis la aliĝojn kaj ke estas dezirinde, ke la infanoj jam nun aĉetu lernolibron.

Lasta formularo (8) estas komunikoj al la gepatroj, kiam kaj kie iliaj infanoj ĉestu la unuan instruaron. Plue ĝi enhavas fakturon kaj kvitancon pri honorario.

\*) Chemnitz, ĉefurbo de saksa distrikto Chemnitz en Saksujo, Germ. Pl. 01 50000 loĝantoj. Multe da fabrikoj. Metala, masina kaj teksta industrio.

## Napolo.

Napolo, la ensorĉa urbo, la lando, al kiu ridetas la plej bela ĉielo, en la ĉama florado de ĝia printempo; Napolo, belega kaj ĉarma, prikanita de la plej grandaj poetoj en la mondo, estas la urbo, kiun pli ol iun ajn oni devas koni kaj ŝafi ĉe ĉiuj ĝiaj detaloj, ĉar tioma krono da naturbelajoj, tioma ĉela brilego, parfumo, ĉarmo, tioma riĉego je historiaj posisignoj, kelkaj el kiuj returneritas al la mitologio, ne estas eĉ konataj de siaj urbanaj mem, kiuj per sia senĝena apatio, tute natura ĉe la orientaj popoloj, al kiuj ili estas poezie tre similaj, ne prizorgas diveni la devenon de tiom da brilego, sed ili kontentigas vivadi en ĝi kaj aŭdi la fremdulojn ekkriantaj: „Vidu Napolon kaj poste mortu!“

Napolo, belega kaj karakteriza kiel urbo, ĉarma en sia ĉirkaŭaĵo, ensorĉa pro sia panoramo, kiun oni plenadmire rigardas el la historia kaj fama „Certoza de S. Martino“, el kie ĝi ŝajnas tera rando dentumita de la Sirenoj, kun ĝiaj diversaj preĝejoj, ĝiaj piramidetoj, ĝiaj konstruaĵoj, ĝiaj antikvaj kaj modernaj, la majestaj kupoloj de ĝiaj preĝejoj, kiuj ŝajnas kisi la ĉielon; Napolo, milde kuŝanta sur sia tapiŝo el violoj, tra l' parfumo de orango kaj mirto, entenas, pli ol ĉiuj aliaj urboj de la mondo, ian impresan sugestion. Nenia

Ekzistas ankoraŭ 9-a presajo: aliĝilo por plenkreskuloj kaj junaj ekslernejoj.

Certe nun, kun tiuj pretaj presajoj, estos ne tre malfacile por aliaj grupoj riski saman entreprenon en sia urbo. Sed vere kortuŝe estas aŭdi pri la malhelpaĵoj, kiujn la bravaj Chemnitzanoj devis venki.

En malvarmega novembra nokto, dum akra, frosta orkano biovis tra la stratoj, kelkaj fervoruloj alĝuis la alvokojn (n-ro 1) sur dommuroj, fosioj ktp. Sed gardis polico kaj arestis unu el la „pekuloj“, kiu estis punata je 50 mk. La unuiĝo devis forpreni la afiŝojn, se ĝi ne volus pagi punon de 500 mk.

Ankaŭ je lifas-kolonoj oni rajne fiksigis afiŝojn (komence n-ro 1, poste n-ro 2). Samtempe oni disdonis en domoj kaj lernejoj alvokojn kaj aliĝilojn kaj petis de la urba lerneja oficejo permeson instrui Esperanton al infanoj 6—14-jaraj en ĉambroj de lernejoj. Permeso estis donata por 10 (el 50) lernejoj, kaj por infanoj de 9—14 jaroj. (Tamen anoncis sin ankaŭ pli junaj infanoj, kiuj estas instruataj private.)

Iom post iom la aliĝiloj alvenis kompletigitaj, kaj fine la instruo povis komenci.

Jen vere laŭdinda fervoro, vere admirinda obstino, vere brila rezulto! Kiu havas la junularon, tiu havas la estontecon! Samideanoj en aliaj urboj, imitu la ekzemplon de Chemnitz! Certe, la afero kostos iom; sed la sukceso pravigas la oferojn. Cetere la mono espezata per honorarioj (ĉiu infano pagas 20 mk., resp. 10, se pluraj infanoj de sama familio vizitas la instruon) multoble superas la antaŭajn elspezojn.

La preseo Hesse & Kaufmann en Chemnitz volonte donos al demandantaj klarigojn kaj sendos specimenojn de la presajoj, kies tekstoj povas esti ŝanĝataj laŭ lokaj cirkonstancoj; eventuale la firmo donos kreditor al Esp. grupoj.

De boninformita flanko, oni skribas al ni pri la ĉapitro „Obstineco“:

La kongresanoj en Hago certe rememoras simple vestitan, malbonan ĉapelon portantan sinjoron, kiu dum la tuta kongres-semajno, eĉ dum la laborokunsidoj, havis tornistrion surdorse, kaj pro tio aliris ĝeneralan atenton.

Kial tiu viro portis tornistrion?

Li faris la vojaĝon al Holando, profunde el fremda lando, centojn da kilometroj, per — biciklo!

Napolo, kiu disiĝas nevole el Napolo, kapablas vivi aŭloke; li konsumetiĝas malrapide, malproksime el la karakteriza bruego de la stratoj de l' plej popolhava urbo de Italio, kaj li nur deziras reveni inter ĝian voluptan vivadon kaj mezen de ĝiaj infanaj deliroj.

Napolo estas la revo de la poetoj: ĉirkaŭata per montetoj, kiuj formas ĝian smeraldan amfiteatron, ĝi estas inspiro de la plej flugilhava fantazio. La tombo de Virgilio estas la gardosiaranto, kiu rigardadas la ensorĉon de Sorento kaj ĝin montras al la kantiistoj!

Napolo estas celo de l' arkeologiistoj: tie estas Pompei, Erkolano, Pozuoli, Baja. Kapri, centro de la orgioj kaj de la krimoj de Tiberio, estas trempita en la Golfo, kiel rifo de historio, kiun bezonas proksime elstudadi; en ĉiuj ĝiaj ŝtonoj estas ilustritaj la estintaj jarcentoj, la pentra ĉarmo de nia jarcento, dum ĝia „Grotta Azzurra“ (= lazura grotto) plenigas la nekredelban ĉarmegon de tiu insulo, kiu estis la teatro de la Ullisaj herooj.

Napolo, same kiel ĉiuj grandaj ĉefurboj, prezentas siajn diversajn vidpunktojn, de lukso kaj de mizero, per siaj „lions“ (= furoruloj) kaj „scugnizzi“ (= ĉifnuloj), kiuj karakterizas la Pariopean medion. Dometoj kaj palacoj, inter kiuj du luksegaj reĝejoj, tiu de „Piazza Plebiscito“ kaj tiu de la ĉarma monteto „Capodimonte“, konfuzigas en komplekso de harmonio, kiu iĝas pli

tutan semajnon li biciklis. Pro trofrequentato pro somergastoj li ne ĉiam trovis noktan loĝejon en vilaĝoj. Tri noktoj li devis „kampumi“, t. e. dormi sur kampo, sub grajna piramido, — la unuan fojon dum fulmotondro.

En tiu grandurbo li devis loĝi en migrantejo, devis senvestigi sin kaj estis esplorata je — pedikoj . . . .

Fine, ĉe la holanda limo, li devis resti du tagojn en iu malgranda sed multekosta banloko, ankaŭ tie ne trovante loĝejon. Estis li tiel elfortigita, ke li ekdormis, apogite je arbo . . . .

Ĉu li sana atingos la kongres-urbon? Aŭ ĉu ne pli bone estos reveturi hejmen?

Jen kio allogas: la stelo de l' espero, brilanta de jam ne tro malproksime tra malluma nokto, — la aro de esperantistoj kongresontaj el la tuta mondo; samideanoj, fratoj —; jen kio donas novan energion, lastan forton.

Ellaciĝo, malsato (ne estis ricevebla eĉ pano en tiu regiono), ĉio estas forgesita. Obstine antaŭen!

Venkas la obstino, alproksimiĝas la celo, — nun la urbo sopirata estas atingita. Riĉega rekompenco por ĉiuj suferoj! Samideano en unu sento kunligita, homaro venkinta la barojn de lingva diverseco, frataro premanta al si reciproke la manon. Nova entuziasmo, nova fervoro, nova energio: infanoj — parte tre malgrandaj — kantas Esp. kantojn al la „kongreso el tuta Eŭropo“. Jen lumeganta fulmo de l' ĉielo! Kaj la fremdlanda biciklinto, veninte de malproksime, centojn da kilometroj per movo de siaj piedoj, obstine kaj spite ĉiujn malhelpaĵojn, li juris al si: ankaŭ en mia urbo infanoj devos lerni Esperanton —

La obstina biciklinto estis la aranĝinto de la „afero“ en Chemnitz: s-ro instruisto Kirchner.

Al ĉi tio ni aldonas jenon: S-ro Kirchner estas tiu sola s-ano, kiu malabonis nian jurnalon pro la „kontraŭfundamenta“ permeso de -io. Ankaŭ per tio sin ja malkaŝas lia obstino. Ni tute ne koleras al li pro tio. Sen lia obstineco ni certe ne estus spertintaj tian belegan sukceson. Kontraŭe, ni gratulas lin tute pro la atingita unika rezultato kaj nur esperas — se li okaze vidos ĉi tiun numeron —, ke li ne koleras al ni pro la publikigo de liaj aventuroj dum lia biciklado al Nederlando. Donu dioj al nia movado pli tiajn homojn, kaj Esperanto jam estos venkinta!

stranga la malsameco de la ŝocia stato kaj de la tekniko de la konstruaĵoj. Napolo allogas diuboĉulojn kaj asketojn: ĝiaj teatroj, inter kiuj la mondfama „S. Carlo“, kiu jam produktis la riĉecon de la plej grandaj artistoj de l' mondo; ĝiaj kafejoj, kluboj, promenejoj, ĝiaj multnombraj amuzajoj, altiras en ĝia eleganta centro ĉiajn personojn avidajn je ĝuado, dum ĝiaj famaj preĝejoj estas la „spirita roĝejo de tiuj, kiuj vivadas tra asketa revado kaj rememoroj.

Napolo resanigas la suferantojn kaj redonas al la paliĝintaj vangoj la koloron de la bonfarto. Ĝia dia klimato, ĝiaj bonklimataj stacioj, ĝiaj miraklaj akvoj iĝas ĝin la lasta haliloko de la homa espero. Kaj, ĉar nuntempa Napolo ne estas plu la urbo kalumniita pro ĝiaj „lazzararoj“ kaj ĝia „camorra“, la urbo kun stratoj malrektaj, malmultaj, insidemaj; ĉar la nuntempa Napolo jam riĉiĝis per belegaj konstruaĵoj kaj majestaj stratoj, ĝia popolo ĝentiligis ĉe la lernejo de evolucio kaj civilizacio, la estraro plenumas skrupule siajn devojn; la rifuĝejoj, la lernejoj, la laborejoj, la industriaj institutoj per ilia kompleta evolucio, donas gloron kaj brilon al la ĉarmega urbo, kiu indas esti konata en ĝiaj loĝantoj, en ĝiaj novaj institucioj, en ĝia estraro, en ĉio tio, konklude, kio koncernas antikvecon, modernecon, progresadon de civila popolo.

La NINO STELLACCI tradukita F. CESARINI





## Tra la Mondo.

La angla parlamento estis malfermata la 15. febr. per tronparolado de la reĝo. La reĝo aludis la venontajn konferencojn en Londono kaj diris, ke li fidus je pluaĵ progresoj, por efikigi la packontraktojn, por restarigi la interkonsenton en Eŭropo kaj por rekvietiĝi la Proksiman Orienton. Plue li esprimis la esperon, ke la interkonsiloj pri la komerca kontrakto kun Ruslando havu sukcesplenan rezulton. Fine li anoncis leĝoprojektojn, kiuj protektu la industrian kontraŭ konkurencon.

La socialsciencia fakultato de la Universitato de Frankfurt nomis d-ron fil. K. E. Markel en London, almeritan organizantan en la zorgo por la germanaj militkapituloj, honora doktoro. Ĉe la akcepto de l' itala ambasadoro Alfredo Frassati per la germana prezidanto Ebert ambaŭ la ambasadoro kaj la prezidanto faris alparolojn, en kiuj ili akcentis la necesecon de paca kunlaborado inter la popoloj.

Laŭ Brusela sciigo, reĝo Alberto je mardo vespere vojaĝis tra Ostendo Londonon.

La polico en Napolo konfiskis sur ŝipo „Ancona“ 1,5 milionon da oraj rubloj. La posedanto asertis, ke la mono servu por aĉeti komercaĵojn en Napolo. Ĉar la aserto ŝajnis nekredinda, estis farata esploro.

Radiotelegramo el Moskvo diras, ke la polara packontrakto estas subsignita la 10-an de februaro. (Ĉu?)

La registaro de Ĉeĥoslovakio postulas disigon de eklezio kaj ŝtato kaj forigon de religia instruado en lernejoj. Laŭ socialistaj gazetoj, en la distrikto de Grand-Praha ekŝiĝis en du semajnoj ĉirkaŭ 100 000 personoj el la katolika eklezio.

Ĉe la elektoj por la sudafrika parlamento venkis la Sudafrika Partio super la Naciema Partio, kiu celas liberigi Afrikon de la brita imperio.

Pluvegadoj en norda Argentino kaŭzis grandajn superakviĝojn. Centoj da familioj perdis sian hejmon.

En Ĉinio estas malsatego pro la konstanta politika maltrankvilo kaj pro aliaj kaŭzoj. 20 milionoj da homoj malsatas. Oni timas epidemiojn. Por helpi la malsatanon, estas decidite meti imposton de 10% sur importon kaj eksporton kaj uzi la el tiu imposton rezultantajn enspezojn por subteni la suferantojn.

## Internacia Esperanto-Servo.

(La traduko kaj la represo en naciaj ĵurnaloj kun aldono de la vortoj „Internacia Esperanto-Servo“ estas permesata.)

### LETERO EL PALESTINIO.

Haifa, 1. febr. 1921.

La plej gravaj aferoj de la lastaj semajnoj en Palestino estas: 1. la novaj limoj, 2. la multnombraj enmigrintoj hebreaj, 3. la kunvenoj kristan-mohametanaj kontraŭ la cionismo, 4. la reveno de la koloniistoj germanaj, 5. la permeso de gren-eksporto, kaj 6. la malpliigo de la okupanta armeo.

1. Per nova kombinado de la franca kaj angla gubernioj la norda limo de Palestino estas antaŭenigita en la supra Galileo orienta. Estonte apartenos al ĝi la tuta baseno de la malgranda lago de Hulah aŭ Merom, enhavanta nordokcidente la judan kolonion Metullah, kaj nordoriente la historian lokon de Banias (Caesarea Philippi de la Nova Testamento). Sed la riĉa regiono de Gaulan kun la bordo orienta de la lago de Tiberias restas sub administraco franca. Ambaŭflanke restas granda malkontento pri tia limigo.

2. Ĉiusemajne alvenas, precipe de Konstantinopolo kaj Triesto, centoj kaj miloj da enmigrintaj judoj el Ruslando aŭ najbaraj landoj, kreskigante la jam grandan bezonon je loĝejoj. Malgraŭ la cionista organizado multaj restas sen okupo, kaj malkontento regas inter ili, precipe inter laboristoj. Multaj estas okupataj per konstruado de stratoj. Ekskavigoj ĉe Tiberias produktis interesegajn trovadojn de malnovaj civilizacioj romana kaj hebra.

3. La malkontento de mahometanoj kaj multaj kristanoj pro troa enmigrado kaj kreskanta influo de la judoj daŭras; kunveno anticionistaj en Haifa kaj Nablus protestis kontraŭ la nuna administraco de Palestino. Por eviti novajn kunvenojn, novaj dekretoj pri tiaj kunvenoj publikigis en la oficialaj ĵurnaloj.

4. Lastan septembron revenis la germanaj internigitoj el Egiptio kaj kelkaj el Germanio; sed la 14-an de januaro revenis kvazaŭ ĉiuj el Germanio en la sama vaporŝipo, nombre 300, kaj okupis grandparte siajn antiaŭajn postenojn en la kolonioj de Jaffa, Haifa, Sarona, Wilhelma kaj Jerusalema. En Jaffa ili estis salutatitaj simpatie de samnacionaj kaj enlandanoj, akompanitaj de orkestro kaj aliaj signoj de jubilo.

5. Palestino, esence terkulturista lando, ne povis ĝis nun eksporti grenon, ĉar la gubernio malpermesis ĝin fimanke mankon de vivrimedoj. Sed sekvis granda manko de mono ĉe la loĝantaro kaj konsekvence granda manko de komerco. Lastatempe la gubernio permesis almenaŭ eksporton de hordeo ĝis certa kvanto.

6. La armeo okupanta Palestinon estas kvazaŭ tute india. Dum 1920 multaj regimentoj forlasis nin; baldaŭ sekvis la resto, sed estos anstataŭata per anglaj regimentoj. La soldatoj indijaj estas ŝtatataj de la enlandanoj pli ol ĉiuj aliaj pro ilia ordemo kaj trankvileco.

La regimentoj indijaj havas specialan poŝtoficon kun specialaj poŝtmarkoj indijaj, surpresitaj l. E. F. La palestinaj poŝtmarkoj kun trilingva surpriso, angla, araba kaj hebrea, ŝanĝiĝis lastatempe; la literoj arabaj pligrandigis. La regiono transjordana uzis, almenaŭ en la urbo de Salt, specialan markon palestinan, surpresitan arabe „Transjordano“, kiu devas interesigi filatelistojn, ĉar ĝi estas tre malofta. P. E. S.

### LETERO EL TURKUJO.

Konstantinopolo, febr. 1921.

Lastatempe Konstantinopolo laŭlitere estis okupita de la rifugiĝintoj el la Krimeo, da kiuj pli ol 100 000 alvenis al ĉi tiu haveno kun apenaŭ antaŭavizo. Eĉ se oni antaŭsciis pri ilia alveno, estis esinta granda entrepreno sufiĉe provizi por tiel granda nombro da homoj kaj infanoj, sed en la cirkonstancoj tio estis preskaŭ nebla. Kvankam multaj personoj eble ne konsentas kun Wrangel kaj liaj sekvantoj, neniu povas rifuzi helpon al malsatantaj homoj ĉe la porde.

Rigardante de proksime la alvenon de la ŝiparo ja estas kompafiĝa vido, ĉiuj ŝipoj plenplenaĵ je nepriskribbla amaso da homoj! La ŝiparo konsistis el ĉiuj ŝipoj, de la militŝipo „Kornifoff“, sur kiu troviĝis Wrangel, al barketoj de nur kelkioj da tunoj. Multaj el ili ne havis sufiĉon da karbo por la tuta vojaĝo, sed devis esti trenataj dum la lasta parto. Tiel kelkaj estis pli ol semajnoj survoje, kaj la suferoj de la rifugiĝintoj tie estis tiel grandaj, ke kelkaj el ili sin mem mortigis. Kvankam la tuta ŝiparo estis nominale sub la prizorgado de la francaj aŭtoritatoj, ĉiuj nacioj propramove kunigis en la help-laboro. La armeo de Wrangel kaj la plimulto de la civiluloj estas forsenditaj al Galipoli, Lemnos insulo kaj aliloke; sed granda nombro ankoraŭ restas en ĉi tiu urbo aŭ ĝiaj ĉirkaŭaĵoj.

La alveno de ĉi tiuj rusoj nature ne helpas al la solvo de l' problemoj pri manko da loĝejoj, kiu jam antaŭ ilia alveno estis freege akra eĉ kompare al la nuna mondmanko turilare. La plimulto de la domoj estas konstruitaj el ligno, brulado okazas sufiĉe ofte, kaj centoj da domoj estas detruitaj. Tamen apatio superregas, kaj neniu serioza peno okazas por kontraŭbatali tion, kio rapide farigis krizon. C. M. C.

### VOĈO DE UKRAJNANO.

En sia Letero el Polio, presita en n-ro 16 de ET, s-ro Francisko Pregel donis ne ĝustan informojn al la esperantistaro pri polio, nome: parolante pri eks-aŭstria parto de Polio, li nenion citis pri tio, ke Galicio estas dividata je okcidenta (pola) kaj orienta (ukrajna). La lasta baralis dum unu jaro por sia sendependeco, kaj — estante nun okupita — neniam konsentis esti parto de Polio. Ĝia sorto ankoraŭ ne estas solvita de Ligo de Nacioj. Estas tre eble, ke oni ĝin solvos plebscite. Do paroli pri tuta Galicio kiel parto de Polio, nun oni jure ne rajtas.

A. K., ukraina eksparlamentano.

## Recenzoj.

### LIBROJ.

INTERNACIAJ FOIROJ DE FRANKFURT. Resumo pri la unua jaro. Eldonita de Foir-Oficejo Frankfurt a. M. (Germ.) Jen vere belega prospektujo pri la internaciaj foiroj de Frankfurt a. M. La formato estas 18 1/2 x 26 cm. 8 paĝoj. Papero estas bona, same la prezo. Multaj ilustraĵoj en kuprosimila koloro plibeligas la kajeron. Ekspresionista ornamado tie ĉi bone efikas.

Pli ol mil propagandfolioj, pli ol cent gazet-artikoloj, pli ol dek detalaj kaj entuziasmaj paroladoj povas efiki sur skeptikulojn unu fia moderne kaj arte farita prospektujo de grava internacia komerca entrepreno. Ĉar, tio estas certa, se ne la ĝisnuna Esp. reklamo estus rezultiginta nepre kontentigan sukceson, la foir-oficejo nun ne eldonus tiun sufiĉe luksan kaj multkoston Esp. prospektion.

La prospektujo do estas plej bona pruvo, ke Esperanto jam vivas kaj forte kreskas en la praktiko. Tiaj pruvoj fine konvinkas la mondon, eĉ se ĝi nun ankoraŭ intencas kaŭzigi obstine aŭ nevole fermas siajn okulojn al tiaj evidentaj sukcesoj. (R-ano.)

RESUMO pri la stato de Revelo je 1. febr. 1921. Eldonita de la Revela estraro, Köln, Hohestr. 26. Hektografa resuma raporto germanlingva pri la Esp. movado en ĉ. 90 lokoj de Rejnlando kaj Vestfalio. 19 grupoj ekzistas en 16 lokoj, el kiuj nur 3 (Kolobenz kaj 2 katolikaj en Bonn kaj Düsseldorf) ne estas membroj de Revelo. 65 el la Revelojn estas instruistoj, 15 kat. pastroj, 15 poŝt-oficejoj. La raporto estas bona pruvo por la fervora agado de la estraro kaj de la anoj de Revelo.

LA URBO DE LA BELEGA SENSAĈJO. De E. Temple Thurston. El la angla lingvo tradukis R. Spero, Pretoria (Sud-Afriko). 15 1/2 x 20 cm. 240 pg. Eldonejo Ludwig Fries (Germana Esperanto-Libro). Leipzig. Prezo: bone kaj bele bindita 21,60 mk (inkluz. multekosteca aligo) aŭ 5 svis. flk.

Emociite mi flingis la recenzenojn libron kaj meditadis pri la sorto de du homoj, pri la sankta kanto de l' amo, pri la dieco de l' animo kaj la mistera enigmo de la spirito.

Ne opiniu, ke la libro parolas pri sensencioj. Certe, la titolon la aŭtoro iom strange formulis. La leginto ekscios, kion signifas sensencio en ĉi tiu verko. Laŭ ĝia malnovitala-greka aranĝo mi estus doninta al la romano — ĉar ĝi ĝi estas — la decan surskribon „Eros“.

Ĉiu klerulo sciatis, ke Eros plengigas la mondon, ke li ĝin movas, ke ĉiu estado kaj estajo dependas grandparte de li. la plej grava kaj la interna punkto de ĉiu religio estis kaj estas la erotika momento. Nenia dubo pri tio ekzistas. Eros — Amo ne estas la ĝusta esprimo en tiu delikata sencio — regas potence en la ĉapitroj de nia iriparta romano.

Johano kaj Jill estas la nomoj de la herooj. Ne estas miliherooj kaj tamen ne malpli estimindaj, ĉar la vivo postulas ofte, tre ofte pli grandan herocon ol estas betalo. Johano, pene perlaborente sian vivon, estas malriĉa verkisto — la aŭtoro lin spirite nomas plumkurigisto; Jill, junulino, malriĉinta filino de bankrota komercisto, hezarde konatigis kun Johano. Ili ekamas unu la alian. Sin aglomeroj kompiliĝoj turmentas ambaŭ geamantojn; sed ŝine — venko kaj felico.

Jen en kelkaj vortoj la nuda trarabo de palaco. Mi ne volas dishakante prezenti al la leganto la ĉarmplenan enhavon de la kortusaŭta rakonto.

Venezio (itale: Venezia), kie loĝas la gepatroj de Johano, estas la urbo de la Belega Sensaĉjo. Johano kaj Jill vivas en Londono. Neŝufiantaj monrimedoj eĉ por modesta vivtenado malpermesas geedziĝon. Gemplore Jill sopiras al Venecio, kiu ŝi ekrigardis deziregas. Sed neeble. Senlace Johano rakontas al ŝi pri la laguna urbo, pri la palacoj de l' dogoj, pri gondoloj kaj noktaŭ remadoj en argenta lunbrilo dumsonomere. Fantazie li klarigas ornamitan, multkoloran bildon kaj desegnas magian skizon revante — revante. Liaj dormetigantaj vortoj sorĉe montras „Fata Morgana“-spegulbildon en rave brileantaj koloroj. Tiamaniere li intencas forigi la ardan sopiron de sia amegatino. Nur revo estis, nur fabela historio, muŝo en sukceso, io malreala, ekstaziganta fantazio. Do: sensencio, sed — belega sensencio. Ni nun facile komprenas la intencan kaj la ideon de l' verkinto. Dromaco estis, ke la sensencio ĝis — sencio. — Sufiĉe. Mi ne rajtas forbari al la leganto la nepriskribeban ĉarmon de la romano, de l' sankta kanto pri — Eros.

Mallonga alineo suficoj por la priparolado laŭ lingva vidpunkto. Mi gratulas la verkiston kaj ne malpli la tradukinton, kiu donacis al ni vere modelan, bonegan tradukon. La stilo estas tre flua kaj korekta, la lingvo en pura Esperanto escepte kelkajn strangaĵojn kaj anglicismojn. Diverstoke mi trovis malkorektaĵojn kaj evitajn kaj facile eviteblajn lingvajn malebenojn. Sed ili tute ne malfaligas la valoron de la libro; krome ili estas bone forigeblaj en venonta eldono. Preseraroj preskaŭ mankas.

Ni ne miras, ke la papero kaj la prezo estas bonegaj, ĉar la libro estas jam presita en 1912. Nur la presilitero estas iom malgranda. El ĉi tiu fakto rezultas, ke la tuta libro konsistas el nur 240 paĝoj (la angla originalo estas presita sur 435 pg.)

Menciindaĵoj estas: katolikanoj (katolikoj), nesuperigebila (ne superbla), sin forturniĝi (!), vestigis (sin vestis); la tradukinto ofte intermiksis „ĝi“ kun „sin ĝi“ aŭ kun la simpla infinitivo; li eraris (eraris); vi estos rimarkigota (ginta), okazigos (okazos), sinteniĝo (sinteniado), velkiĝintaĵ (velkintaĵ); li estas moria (mortinta, aŭ: li mortis). Nova vorto: buto (breto); ekzaku (pardoni, senkulpiĝi); spite tio (spite de tio al spite tium) ktp. Tamen, ne estas grave; la valoro de la libro restas same alta.

Mi varme rekomendas la bonegan libron al ĉiu, kiu ŝategas bonan, edifan literaturajn, kaj promesas, ke li ne pentos la monoferon konsiderante, ke pro la malalta valuto la prez-aligo por libroj ne estis evitebla. Guo estos la rekompenco. El la nebuloza Londono kondukos nin serpentinforma vojo preter haltejoj kaj epizodoj ne ĉiutagaj al Italio, la majesta stakado de l' „Canale Grande“, aŭdigos nin ja melodian kantadon de brun-okulaj gondolistoj, kaj ni ekvidos tiun lokon, orbrilantan en la radianta suno de l' sudo — la urbon de Belega Sensaĉjo. (G. AJUL.)

### GAZETOJ.

BULGARA ESPERANTISTO. Febr. Plendas, ke ĝi ne ricevis raportojn de la bulg. grupoj pri ilia agado.

DER ARBEITER-ESPERANTIST (La Laborista Esperantisto). Febr. Raportas pri vigla agado en Bremen, Breslaj, Chemnitz, Hannover, Köln, Nürnberg kaj Wernigerode. Novaj lab. grupoj en Augsburg, Mainz, Sprengling apud Offenbach, Vilbel en Heslando kaj Köln-Kalk. ESPERANTISTA LABORISTA. Febr. Kun diversaj ĝeneralaj artikoloj. Avoko de Henri Barbusse al la internaciistoj, kiu devus esti tradukata kaj represata en ĉiuj lingvoj, ĉar ĝi bone propagandas por nia afero. Kursoj inter laboristoj en Firminy (Franc.) kaj Zürich (Svis.) ESPERANTO-PRAKTIKO. Febr.

Aperas nun en nova vesto, i. e. kun plaĉa kovrilo. Enhavo preskaŭ tute en Esperanto. LA VERDA OMBRO. Dec. 1920. En japana kaj Esp. lingvoj. Hektografa. Aperas baldaŭ presita. Ni ne komprenas, ke estas vivopovaj tiom da Esp. gazetoj en Japanio: Verda Ombro, Verda Utopio, Revuo Orienta, La Espero (Osaka).

NOVA TEMPO. Jan. La gazeto nun eliras je malpli bonkvalita, sed eble pli plaĉa aranĝo. Artikoloj: Ni virinoj kaj la internaciismo. — La Societo de Amikoj (Kvakeroj). — Historiaj rimarkoj el la mondlingva movado.

THE BRITISH ESPERANTIST. Febr. Anglalingva artikolo pri „Esperanto en la konferenco de edukadaj asocioj ĉe Universitata Kolegio, Londono“.

## Parolejo.

55.

### FLARI TABAKON.

Leginte la unuan klarigon de s-ro Lippmann kaj la respondojn de s-ano G. AJUL, mi nek tute konsentas kun la unua, nek tute kontraŭas la dua, escepte rilate la firmaron de s-ro AJUL. „Eĉ la fakto, ke nia morinta majstro uzis la esprimon, ne estas pruvo de ĝusteco.“ Mi antaŭ iom da tempo verkis grandetan artikolon „La hodiaŭa stato de Esperanto“ (kiun ET eble publikigos en unu el la venontaj numeroj) kaj mi preparas grandan komenton al unu el la verkoj de nia majstro, en kiu mi pli detale pravas tiun ĉi frazon. Konstatante, ke nia gramatiko estas nepre logika, ni devas klopodi, tiamaniere uzi la ekzistantajn radikojn kaj sufiksojn, ke ni kiel ĉi plej logike (eĉ pli logike ol la naciaj lingvoj) esprimas niajn ideojn (Esperanto. Kaj se s-ro Carl (ET, Parolejo 53) diras: „Ni ne malplifaciligu la uzon de nia lingvo per tro da severeco“, li estas malprava! Certe, parolante nian lingvon dum babilado, ni ne bezonas „tro da severeco“, tiel same kiel, parolante nacian lingvon, ni konscie uzas malgrandajn nekorektaĵojn. Sed en nia literaturo, tiel same kiel en la naciaj lingvoj, ni ne povas apliki sufiĉe da severeco.

Rilate la tabakon mia opinio, pro tio, estas la jena: „La tabako fumus“, sekve: mi fumigas la tabakon, la cigaron, la cigaredon“, kaj ni devus uzi ĉi tiu ĉi formon, kvankam, germane, „ich rauche“ kaj „die Zigarre raucht“, france, „je fume“ kaj „le cigare fume aussi“, angle, „I smoke“ kaj „the cigar smokes“ ktp. La vorto „prise“ estas franca kaj signifas „prenaĵo“ aŭ „prenitaĵo“, kaj ĝi estas uzata en franca kiel ankaŭ en aliaj lingvoj por tabako kaj tiel same por aliaj aĵoj; ekzemple, en germana lingvo, oni diras, ke „oni metas „eine Prise“ da salo en la suppon“. Kiel jam konstatite de aliaj pripensemluloj, ankaŭ la vorto „flari“ ne estas korekta, ĉar, se mi „flaras rozon“, mi „enspiras per la nazo por ĝi la odoron“. Mi ankaŭ „enspiras per la nazo“ flarante tabakon, sed ne pro la odoro, sed simple por, tiamaniere, envenigi la tabakon en la nazon. Mi, pro tio, uzas alian vorton laŭ nepre kaj sole esperanta maniero: mi „verbigus“ la radikon „naz-“, mi dirus „nazi tabakon“ kaj tiel formus per jam konata Esp. radiko esprimon netradukeblan en nacian lingvon kaj tamen absolute klaran kaj ne malkomprenablan. CARL MINOR.

56.

### „ESCEPTE“ AŬ „KROM“.

Tralegante antaŭ ne longe Esperantan gazeton, mi rimarkis oftan uzadon de escepte kaj prepozicio sen akuzativo, anstataŭ la prepozicio krom.

„Krom“ estas prepozicio, kies ĝusta uzo ne estas tre bone komprenata de kelkaj esperantistoj. Ĝi estas prete

el la rusa lingvo, sekve ĝi ne estas tiel bone konata kiel la radiko *escepti*, kiun anglaj kaj francaj tre ofte adverbigas kaj prepoziciigas por traduki *excepti*, *excepté*.

En Lingvaj Respondoj (Serio de La Revuo p. 21) d-ro Zamenhof diras: La prepozicio „krom“ antaŭ iu vorto signifas, ke tiu vorto staras ekstere la temo de nia parolo, ke ni rigardas ĝin kiel ion apartan; tial ĝi povas havi egale bone la senco de *escepto* kaj la senco de *aldono*, depende de la cirkonstancoj, en kiuj ĝi estas uzata. „Krom“ per si mem esprimas nek *escepton*, nek *aldonon*, ĝi esprimas nur apartigon; sed ĉu tiu apartigo estas farata por ion forigi, aŭ kontraŭe, por ĝin pli akcenti, tion montras la senco de la frazo mem. Ekzemple, kiam mi diras: „ĉi estas ĉiuj miaj fratoj *krom* Petro“, ĉiu komprenas, ke mi apartigas Petron, por montri, ke li ne estas inter la „ĉiuj“; sed kiam mi diras: „*krom* Petro ĉi estas ankaŭ ĉiuj aliaj miaj fratoj“, oni facile komprenas, ke ĉi tiu mi apartigas Petron nur tial, ke pri li mi jam parolis, aŭ pri li oni jam scias, ke li ĉi estas aŭ ke li devas esti. Komprenable la vorto „krom“ povas ufoje kaŭzi neprecizecon aŭ malkomprenigon; sed en tiuj okazoj ni devas eviti la vorton „krom“ kaj uzi anstataŭ ĝi la pli precizajn esprimojn „*esceptinte*“ aŭ „ne sole, sed ankaŭ“.

Mi ne trovis la vorton *escepte* en iu verko de Zamenhof. Li uzas laŭ la konsilo en Lingvaj Respondoj, „*escepti*“ kun particepsa afiksio.

Ĉia konkurado estas por ĉiam *esceptita*. F. K. 309. Li ne zorgadis pri siaj soldatoj, nek pri teatro kaj ĉaso, *esceptinte* nur se ili donadis al li okazon montri sian novajn vestojn. F. K. 19.

Li neniam forlasis Baharabon, *esceptante* nur okazon de danĝero por la vivo. Bab. 243. Celadon al lingvo internacia ne devas *escepti* eĉ la plej varmega ŝovinismo. F. K. 275. Se ni *esceptos* ian kriantran erarpaŝon. F. K. 276.

Ni komparu kelke da frazoj, en kiuj ni trovas „krom“ en la verkoj de Zamenhof.

1. Kun la senco de *aldono* (la matematika signo +).  
Ĝi volis havi, *krom* sia havo ankaŭ la amikon. F. K. 426. Estis en la salono neniu *krom* li. Ekz. s. 26.  
... kiuj ne scias alian lingvon *krom* sia propra. Ekz. s. 27.

*Krom* la malplena teksto nenio estis. F. K. 21. Ne ekzistas Dio *krom* Mi. Read. XXII. 59. Kiu estas Dio, *krom* la Eterneco? Ps. XVII. 52. Ĝi per nenio ĝin meritis, *krom* eble per... Maria p. 68. La pli luna filino, kiu estis... estis *krom* tio... Ekz. s. 11.

Ne ekzistas alia bono por la homo *krom* manĝi kaj trinki. Pred. II. 24.

2. Kun la senco de *escepto* (la matematika signo -).  
Kiu jam edziĝis restu viva, ĉiuj, *krom* unu. Ham. 78. Ĉio en ĝi estis saĝe serena, *krom* la frunto. Maria p. 168.

Kiam ĉiuj dormis, *krom* la direktistino. F. K. 55. Ĝiaj vortoj, *krom* tre malmultaj, ... ne estas arbitre elpensitaj. F. K. 305.

En la Vortaro de Kabe oni legas: *Escepti*: Ne kunpreni, ne kalkulati, eligi el la nombro de: la mortigistojn oni *esceptis* el la amnestio. *Escepto*: Afero *esceptita*: la *esceptoj* konfirmas la regulojn.

Mi do konkludas, ke oni devas uzi *escepto* *krom* kiam ĝi ne enkondukas neprecizecon aŭ malkomprenigon. Oni rezervu *escepte* nur por prezenti la sencan de la angla vorto „*exceptionally*“. Ekz.: *Escepte*, ni *akceptis* abonon por duona jaro. (Ordinare la administracio *akceptis* nur plentjaran abonon.) (W. M. Page, Edinburgh.)

## Repagu vian abonon!

Abono finiĝas per sekvanata numero:

Germanio kaj Aŭstrio.

14. Lauerhaas en Nürnberg. Sappl en Graz.  
15. Schliiter en Dortmund. Nellissen en Schlussee.

16. Jakobs en Flensburg. Usko en Skopau.

Richter en Hirschfeld. Riedel en Seifendorf.

17. Thies kaj Remers en Düsseldorf. Gronau en Gelsenkirchen. Urban en Frankfurt. Lorenzen en Flensburg. Höfer en Zachow. Rothermel en Friedrichswerth.

18. Zeidler en Nordrach. Köhler en Dresden.

19. Schüller en Düsseldorf. Bartel en Graz.

Dorer en Knittelfeld.

20. Hebing kaj Harkämper en Köln. Oster en Godesberg. Wolferz en Menzelen. Mühe en Hagen. Becker en Mainz. Wüster en Charlottenburg. Muthschall en Halle. Schmidt en Gera. Lutzin en Breslau.

Aliaj landoj.

12. Tael en Paide. Garzelli en Seirjaj. Kubešova en Trebon. Podlipsky en Smichow. Sabev en Seblevsko. Minkov en Sofia.

15. Polusstelo en Helsinki.

14. Rosta en Helsinki.

16. Glicenštejn en Kalisz. Spire en Uzhorod. Černy en Trebechovice.

17. Kosonen en Wiipuri. Fasane en Tallinn. Schutzyk en Philadelphia. Villafranca en Buenos Aires (12 abonoj).

18. Grünthal en Haapsalu (3 abonoj). Garbala en Skarzynsko. Kolev en Sofia. Szekacs en Vacz.

19. Suzrink en Deventer. Goldsmith en Birmingham. Laquer, Lorand, Tolnai kaj Urba Biblioteko en Budapeŝto.

20. Bidaux kaj Ladrière en Paris. Meyer en La Rochelle. Gammon en Cardiff. Vaher en Tallinn. Sakevičius en Sintaŭai. S. Kelson en Marijampole. Dombrovski en Kaunas. Paysanda en Pelotas. Baena en Para. Kalocsaj, Szabo kaj Kürschner en Budapeŝto.

21. Wooriman, Korbijn, Klaasen kaj Roskes en Rotterdam. Goodliffe en Purley. Fairman en London. BEA (10 abonoj). Holmström en Falun. Finholt en Akersbakken (10 abonoj). Witherlehto en Käppälä. Svinikunni en Simnas. Blozneltus kaj Urbonui en Alytus. Aзуоlaičiui kaj Maksimavičius en Lazdiŭai. Dauglita en Kalvarija. Brown en Ann Arbor.

22. Kurassov en Tallinn. Šapiro en Bialystok. Jarysta en Czesochova.

Kelkaj el la supre nomitaj abonantoj intertempe jam repagis.

# 4<sup>a</sup> Internacia Foiro de Frankfurt a. M.

\*\*\* Printempa foiro: 10.—16. aprilo 1921. \*\*\*

Ampleksa ekspozicio de 50 branĉoj.  
Programo:  
— Importo kaj Eksporto. —

Akcelado kaj rekonstruado de la internacia interŝanĝo de komercaĵoj.  
Prospektoj en germana, angla, franca, itala, hispana, dana, norvega,  
\*\*\* holanda, sveda lingvoj kaj Esperanto. \*\*\*  
Korespondado en Esperanto!

Antaŭ-Katalogo kun plurlingva registro, Listo de la Komercaj Branĉoj en Esperanto.  
Oni petu tuj presaĵojn aŭ detalajn informojn de  
**Messamt (Esperanto-fako) Frankfurt a Main (Germanujo).**

Pola eldonisto havas la eblon tuj liveri 1000 ekzemplerojn de la fame konata verko

## „Parnaso de Popoloj“ majstre tradukita de Antoni Grabowski.

La libro enhavas *krom* originalaj poemoj ankaŭ tradukojn el 50 diversaj lingvoj.

Grardforma libro 250-paĝa.

Prezo malkara.

La ofertojn oni bonvolu direkti laŭ adreso:  
Adolfo Oberrotman, del. UEA en Varsovio,  
Krak-Przedm. 10 (Polio).

## Firmoj

kiuj havas intereson por germanaj komercaĵoj (egale de kia branĉo) kaj kiuj serĉas interrilaton kun germanaj firmoj, sin turnu al

**Karl Kurfürst, Plauen i. Vogtl.**  
Schliessfach 154.

Importo. General-Agentejo. Eksporto.

### Anoncoj.

ANGLA LINGVO. Anglaj gesamideanoj! Kiu volas al mi helpi en la lernado de la angla lingvo, skribu al mi. Jozefo Major, Budapeŝto IX, Remete str. 56-II-4.

FOTOGRAF-ARTO. S-ro Otto Emmert, Berlin-Friedenau, Odenwaldstr. 23, l. deziras interŝanĝi fotografaĵojn kaj litojn pri fotograf-arto kun esperantistoj de ĉiuj landoj. Ĉiam tuj respondos.

GRAMOFONOJ. S-ro J. T. Holmes, Roundwood Grange, Baildon, Shipley (Anglujo), deziras aĉeti gramofonajn diskojn surhavantajn Esp. kantojn, deklamojn k. s. Proponojn kun ĉiuj detaloj sendu al li.

INFORM-PETO. S-ino Adele Sommer, el Semlin (Zimuny), Hungarujo. Mi petegas kaj kore dankos ian informon pri iu samideano. Skribu al s-ro Paulino Santiago, del. UEA, Maceio-Alagoas, Brazilo.

MUZIKO. Al Mexin, Montreux (Svisio), 63, Grand'Rue, petas sendi al si Esp. kantojn kun muziko, solajn aŭ horajn himnojn, romanojn ktp. Pagos aŭ interŝanĝos kontraŭ io alia.

SENPAGE mi sendas Manifeston de Nederlando Kontraŭ-Militaristoj al ĉiu, kiu petas ĝin per il. poŝtkarto. G. P. de Bruin, Alleeweg 9, Enschede (Holando).

DEZIRAS KORESPONDI AŬ INTERŜANĜI:

Korespondantojn mi deziras por kuragigi kaj instigi la kursanojn en oficiala kurso Londona. Robert Robertson, 364 Alexandra Park Road, London N. 22.

S-ro V. Sergejev deziras korespondadi kun fraŭlinoj. Adreso: Estonio, Revalo (Tallinn), Riisenkampfi t. 29-1. F-ino Ksenja Kurassov deziras korespondadi per poŝtkartoj kaj litojn. Adreso: Estonio, Revalo (Tallinn), Riisenkampfi t. 29-5.

F-ino Elinjo Lampert, Budapeŝto IX, Örmölygöy-str. 44-IV-74, deziras korespondadon kun ĉiuj landoj. Tuj respondos.

F-ino Julinjo Lampert, Budapeŝto IX, Örmölygöy-str. 44-IV-74, deziras korespondadon kun ĉiuj landoj. Tuj respondos.

S-ro Vilhelmo Balint, Budapeŝto IX, Szigony str. 8 part., deziras korespondadi kun samideanoj en ĉiuj landoj.

Estimataj gekamaradoj! Kiu volas korespondadi kun hungaraj laboristoj per poŝtkartoj ilustritaj, sendu sian adreson al f-ino Terenzio Batta, sekretarino, Budapeŝto X, Gat utca 51-116. Ĉiu ricevos respondon.

S-ro F. Derr, Düsseldorf (Germ.), Düsseldorfstr. 65, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn.

Vicento Oriando, Santa Fé 77, Bahia Blanca (Argentino), deziras korespondi kun anoj de ĉiuj landoj.

Antonio Lattanzio, Darragueira 245, Bahia Blanca (Argent.), deziras korespondi kun ĉiutandaj samideanoj.

Isidoro Fernandez, Pie. Roca 67, Bahia Blanca (Argentino), deziras korespondadon kun samideanoj en ĉiuj landoj.

Postmarkojn interŝanĝas A. Villarranca, str. B. de Irigoyen, 1105, Buenos Aires, Argentina Respubliko. — Minimuma sendo 100 malsamaj pm. de sola lando.

Varsovio, Polio, str. Ziota 51, s-ro Konstanty Chmielewski, deziras interŝanĝi kun diversaj esperantistoj tiumondaj. Kiu sendos al mi diversajn poŝtmarkojn militian ricevos de mi rekompence diversajn neuzitajn kartojn ilustritajn.

## Brazilio!

Sinjoro J. BLOOMFIELD, komisiisto, deziras reprezenti eksterlandajn firmojn.  
Adreso: Strato Rosario, 152, I-a etaĝo,  
RIO DE JANEIRO, Brazilio.  
Telegrafa adreso: TATU.

La Fabrikado de

## Fratoj Stork kaj K-io Hengelo (O), Nederlando

konsistas en:

VAPORTURBINOJ, sistemo Zoelly, por ĉiu potenco.

VAPORKALDRONOJ, horizontalaj kaj vertikalaj, de ĉiu grandeco kaj diversaj sistemoj, interalie Babcock-Wilcox akvotubo-kaldronoj por normala kaj tre alta vaporigo.

VAPORMAŝINOJ, horizontalfaj kaj vertikalaj, kun vapordivido per klapoj aŭ glitfermioj, ĝis la plej grandaj ampleksoj kaj de diversaj sistemoj, i. a. kontinuufluj vapormaŝinoj de Stork-Stumpf.

TUBO-KONDUKILAROJ por elektraj centroj kaj fabrikejoj.

CENTRIFUGAJ PUMPILOJ por ĉia produkto kaj levato, por senakvigo de poldroj, akvotubaroj, kaldrononitro, kondensio-arangoj ktp.

LEV- kaj TRANSPORTILOJ, i. a. irleviloj por elektraj centroj kaj fabrikejoj, karbotransportarangoj.

DIVERSAJ MAŝINOJ por SUKERFABRIKEJOJ kaj RAFINEJOJ.

RESERVEJLO de ĉiu amplekso.

MOVIGILARO. FANDAJO. KRADOSTANGOJ.

## MAŝINOJN

por agrikulturo, elektro-teknikajn artikolojn, kolorigilojn, ludaĵojn ktp. liveras al ĉiuj landoj

## Rudolf Meyer, Frankfurt a. M.-West

(Germ.), Rödelheimer Landstr. 24.

## Marius Nielsen

Baumaterialien-Maschinen

## Eilenburg bei Leipzig (Germ.)

rekompensas siajn maŝinojn por fabriki tegolojn kaj plataĵojn ĉiumaniere, same kiel fasonajn aŭ kavajn ŝtonojn el kalko kaj sablo.

Oni petu pli detalajn informojn.

## CIGAROJ!

Kun la eksterlando serĉas diversajn

relatojn sinjorino Mühlpfordt, #

Cigar-fabrika,

Neumarkt 50, Merseburg/Saale, Germ.